
Kurondo Luko
numero 13



1-a trimestro 2009

En tiu numero vi legos..

Kial turo de la kastelo de Tours nomiĝas « Turo de Guise » ? D. Baron donas klarigojn.	p.1 p.2 p.3
J-J. Moreau tandeme sekvis la Danubon.	p.3 p.4
Ĉu ĉapelo estas ornamaĵo? J. Gaumé daŭrigas la liston de la paroj sen/kun ĉapelo.	p.5
F. Fouquet rakontas la kolektadon de la olivoj.	p.6
J. Turbillon partoprenis en la U. K. de Roterdamo kaj en la postkongresa ekskurso.	p.6 p.7
Nia Ĉeka amikino, Marie Zíková raportas pri meditĝardeno.	p.7
M-Cl Ledoux proponas du receptojn kun kukurbetoj.	p.8
André Aude memoras pri la fruaj jaroj de la Kulturdomo de Grésillon.	p.8
Vi trovos la solvon de la vortludo proponita sur T. L. 12	p. 8

La fuĝo de la duko de Guise

La kastelo de Tours estis konstruita borde de la riverego Loire. Dum la somero, nur la ranetoj aŭdigis sian ĉiaman kvakadon.

Nu, en la favora jaro 1591ª, en kvieta vespero de Aŭgusto, subite oni aŭdis, superantajn la koncerton de la batrakoj, plurajn 'kroaks, kroaks', maltime eligitajn de homa voĉo. Estis tiu de dudek jara malliberulo, kiu, rigardinte ĉe la fera krado de la plej alta fenestro de la ĉefturo, tuj malaperis.

« kroaks, kroaks » ! respondis fluta voĉo, kiu venis el la ekstremo de la ponto situanta fronte de la kastelo.

« kroaks, kroaks » ! kaj ŝtonĵetita, ŝtoneto volvita de papero falis en la ĉelon tra du feraj stangoj. La malliberulo prenis la sendaĵon kaj, en angulo de la ĉelo, malvolvis la paperon kaj legis :"ĝis morgaŭ, senjoro."

Senjoro Karolo la Unua, duko de Guise, malliberigita en la kastelo de Tours de 3 jaroj, tuj post la murdo de la patro Henriko la Unua la Strekvundita (le Balafré), ridetis kaj englutante la paperon, murmuris : « ha ! la beleta lavistino estas anĝelo ! Morgaŭ, jes, morgaŭ mi estos libera, eble. » Eble ?

Subita penso malheligis lian menson. Kiel li povos forsavi sin el tiu alta turo, malsupreniri, enŝoviĝi kaj rampi en la fosaĵoj duone senakvigitaj ? « Sed la juna lavistino ja kaŝis en la korbo de miaj vestaĵoj longan kaj fortikan ŝnuron. Ja, mi havas fortikajn brakojn. Revidi mian familion, miajn amikojn, partizanojn donas al mi firman volon fuĝi. Mi volas lasi tiujn murojn, kie mi suferis. » Sed li aldonis mense: « Staras dekdu gardistoj bone armitaj ; la murego estas alta, pafo de arkebuzo povas trafi min; kaj kien mi iros ? Kiu helpos min ? Mi scias, ke mia beleta lavistino certe trovis gvidiston. Ha ! se mi povus trapasi la riveron Cher situantan fore de mi, mi estus savita ! »



Li tiel revis, kiam pluraj gvatistoj paŝis sur la rundovojo. Supre de la ĉelo, iliaj pezaj botoj resonis, kaj oni aŭdis frapojn de la dura tenilo de iliaj halebardoj. Pasis la nokto kaj la mateno. La katedrala sonorilego ba-

se bruis kaj 'Notre Dame des Boires' aŭdigis ĝojan sonorilaron en sia truhava sonorilturo.

« Estas la 15ª de Aŭgusto, tago de la Ĉieliro de Maria. Estas senlabora festo, diras servisto enirante. Ĉu vi dezirus, ke mi partoprenu la diservon en la katedralo ?

- Jes, diras la princo, kaj lasu ĉi-tie miajn blankajn littukojn ; vi prenos ilin morgaŭ por pretigi mian kuŝejon. »

Kaj la sonoriloj sonoris en la tridek preĝejaj turoj de Tours. De "Saint Pierre le Puellier" ĝis "Recollets" regis festa ĝojo. La gardistoj mem, en la kastelo, ĝojigitaj de tagmanĝo kun bongustaj vinoj, demetis siajn armilojn : unuj ludis per bilboko, la aliaj per ludostoj, dume nur unu gardisto gvatis ĉe la kreneloj.

La juna duko malsupreniris en la korton. Li momente interesiĝis pri la ludoj. Ideo ekis : « Mi konas alian ludon , diris li, kaj mi proponas al vi defion. »

Je tiu vorto, la soldatoj forlasis la bilbokon kaj ludostojn.

- Kiu defio ? grumblis unu el ili.
- Mi proponas, diris la juna Guise, plej rapide supreniri unupiede la ŝtuparon de la turo. »

Kaj ĉiuj, en la petita pozo, ekgrimpis la imponan ŝtonan ŝtuparon, kiu turnis, turnis.

Dum tiu tempo, la duko rapide supreniras en sian ĉambron, riglas la pordon, krias al unu el siaj servistoj amuzi la gardistojn rimarkante al ili, ke pluraj friponas. Tiam la soldataj oreloj ruĝiĝas. Ili insultas la serviston, kraĉas al lia vizaĝo, kaj, per ŝelko de arkebuzo, kondukas lin en la korton por vipi lin.

Dume, la duko ekprenas la ŝnuron el la korbo, firme ligas ĝin al unu el la stangoj, kaj tra ili, li pasas ne sen peno, lasas sin ŝoviĝi preter la murego. Sed la gvatisto sur la rundovojo vidis la dukon. Pafo ! Guise ektimas, malprenas la ŝnuron kaj falas de la alto de 15 futoj (15 x 33 cm = 495cm). Li palpas sin : li ne estas vundita, kvankam kontuzita, kaj jen li kuras laŭlonge de la fosaĵo duone senakvigita, li atingas la murojn de la urbo. Li jam transpaŝis la straton Maufumier. Li estas ŝvitoplena : lia brustovesto estas ŝirita kaj la ĉapelo perdita. Nun la duko iom ĉirkaŭiras la remparon kaj spirmanka, suriras la strandon de la Loire.



En Notre-Dame-La-Riche, bakisto ligis maljunan ĉevalon al paliso. La juna fuĝanto malligas la rajdbeston kaj ekkaptante ĝin, saltas sur la ĉevalaĉon. Oni postkuras lin. Li daŭre fuĝas, kiam maljunulino, kiu iam balais la ĉefturan ŝtuparon, rekonas lin kaj krias al ĉiu piediranto : « la "Guisard", estas la "Guisard", kiu fuĝas .» La duko frapas la ĉevalon per la kalkanumo de siaj botoj kaj jen la bordo de Cher. Pramisto atendas lin. Guise saltas el la ĉevalo kaj enboatiĝas. De la dekstra bordo de la rivero, oni krias, hurlas, minacas, pafas ; barkoj ekpostmoviĝas sed la fuĝanto estas jam sur la alia bordo. Timo ekaperas, sed tuj vaporiĝas. Kiu atendas lin ? Estas la ĉarma lavistino, komplico de la forfuĝo. Ŝi surmetis sian konusĉapelon, sian ŝalon el bela ŝtofo kaj sian novan robon el fusteno.

- Senjoro, senjoro ! ekkrias ŝi, vi estas savita !
- Oh ! beleta turto, diras la duko, mi kisu vian be-

lan blankan kolon !
- Jen mi, jen mi, diras la barono de Monford elirante el loĝejo, jen mi kun 200 viroj kaj viaj partizanoj. Estas urĝe. Tuj prenu tiun-ĉi militan kurĉevalon, kaj selen ! »

Kaj la ĉarma lavistino, tute surprizita de la senjora kiso, rigardas lin foriri. Ŝi perokule sekvas lin ĝis vojturniĝo. De tiam, ĉiu loĝanto nomas la kastelan ĉefturon : ***turo de Guise***.

Dominique Baron

● ● ● ● ● ●

Pri nia vojaĝo tandema al la nigra maro

Laŭirante la porbiciklan vojon t. n. « La Luaron bicikle », ni rendevuas kun ses paroj, ĉiuj anoj el la « Tandema Klubo de Francio » (mia edzino kaj mi, helpitaj de kelkaj aliaj getandemantoj, kreis tiun klubon, antaŭ dudek jaroj). En Mulhuzo, ni devas renkonti niajn amikojn en la junulara gastejo, kie ni dormas nur unu nokton. Poste ni foriras al la fonto de la Danubo, en Germanio, pli precize en la Nigra Arbaro. Unu anino el la grupo de Mulhuzo ĉiĉeronas nin. Mi elreviĝas, mi ne pensis trovi tian rivereton, en mia kapo mi pensis pri aliaĵo. Poste, ju pli ni antaŭeniras, des pli la rivereto riveriĝas. La Danubo konsistas el du tre etaj riveretoj, la Brigach kaj la Breg, ili kuniĝas en Donaueschingen. Ekde tiu loko, la rivero nomiĝas « Danubo », ĝi elfluas dum 2902 kilometroj, oni kalkulis ĝin de la nigra maro ĝis la fonto (mi ne scias kial). Ĝi trapasas multajn ĉefajn urbojn el kiuj ni vizitas VIENO (N) (la plej bela el ĉiuj), BRATISLAVO(N), BUDAPEŜTO(N), BEOGRADO(N). La Danubo enmariĝas en Rumanio en la nigran maron. Ĝi fluas fariĝante landlimojn inter dek landoj ; Germanio, Svislando, Aŭstrio, Slovakio, Hungario, Kroatio, Serbio, Bulgario, Moldavio, Ukranio (ni ne iris en tiuj du lastaj landoj). Regule ni pasas de Germanio en Svislando, sen ĝin konscii. Kelkfoje mi ne scias, kie ni estas, sed ne gravas. La irvojoj estas bone indikitaj, poste ni malkovras ke la indikpaneloj mankas. Antaŭ ol retrovi la Danubon, ni haltas pro belega spektaklo « la akvofaloj de la Rejno », memorinda momento. Ĉe la piedo de la akvofaloj estas japanaj



Schaffhausen. Piede de la akvofaloj de la Rejno, Hindo staras fiere ĉe la tandemo.

turistoj, kiam ili malkovras la tandemojn, ĉiuj volas rajdi ilin kaj esti fotitaj. Ili preskaŭ faligis mian rajdobeston, kiu estis starigita per starigilo. Mi tremas ĉar mi amas mian biciklon, mi preferas diri ami ol ŝategi.

Mi surpriziĝas kiam mi konstatas ke la registoj ne komprenas la ekonomian forton de turismo, aŭ, kiam ili komprenas, ili ne havas sufiĉe da mono, mi pensas ĉefe pri la sovetaj ekslandoj, la homoj ne kutimis preni iniciatiojn, do, nun, estas malfacile fari malsame.

Ni havas nur unu monaton por nia periplo ĉar,



Bad Sackingen : okultrompaĵoj

inter ni, estas ankaŭ laboristoj, tial, ni estas pli ofte sur la selo ol turismante, ni bedaŭras ĉefe la parton Aŭstrian, kie laŭ la Danubo, oni trovas vojiron t. n. « Speciala Baroko », ni kontentigos nin pri la ĉefaj urboj. En Germanio, Svislando, Aŭstrio, la porbiciklaj vojoj estas komfortaj kaj

bone indikitaj. Kelkfoje ni foriras el la Danubo ĉar ne eblas laŭiri la riveregon, la klifoj estas tro krutaj. « Malsupreniri » la Danubon, ne signifas vojon sen deklivo, ni renkontas ofte vojojn kaj Ŝoseojn difektitajn, sur kies radsulkoj estas malfacile idli aŭ spurti. Kelkaj inter ni, falas sen graveco. Mi konsilas al tiuj, kiuj volas bicikli kiel ni, havi komfortajn kaj solidajn biciklojn, ĉefe pneŭmatikojn

La vegetaĵoj ofte kaŝas la trafikŝildojn, devigante nin trakuri pli da kilometroj ol antaŭvidinte, en tia momento, oni povus aŭdi flugi muŝo. Feliĉe, la vojoj estas sekaj, mi ne imagas la inferon se pluvus, la koto ŝtopus la kotŝirmilojn. Ni elektis la bonan mezjunian sezonon. La unuan vizitan urbon nomiĝas ULM, en Germanio, urbon belegan, puregan. La muroj de la urbodomo estas ornamitaj de okultrompaĵoj, unu el ni apogas sian tandemon ĉe la muro, iu admonas lin : « tie oni respektas la disciplinon ! » La katedralo estas gotika, interne ĉio belbrilegas, ĝia turpinto estas la plej alta el la mondo : 161,6 metrojn. La aŭstria armeo kapitulacis en mil okcent kvin, antaŭ Napoleono la I^{a}. ULM estas ankaŭ la patrujo de Einstein.



Ulm, la bela urbodomo

La germanaj aŭtomobilistoj respektemas la biciklantojn, eĉ kiam ili eraras. Kelkaj aĉaj ŝoforoj el nia lando devus inspiri al si pri tio. Se la distanco ne sufiĉas por elviciĝi kaj preterveturi, ili atendas pacience sen hupi. La Germanio estas la lando kie ni plej plezuris. La aŭtomobilistoj ne estas agresemaj.

Unufojon semajne, mia edzino kaj mi deĵoras. Ni devas trovi lokon kie dormi… sen forgesi manĝi, estas ĉu tendumejo, ĉu hotelo, ĉu junulargastejo… aŭ alie… estas la aventuro. Feliĉe hodiaŭ ni estas ankoraŭ en lando, kie oni povas trovi ĝin.

En la tendumejoj, per manoj aŭ desegnoj montrante sep tendojn, dek kvar personojn kaj unu veturilon, oni povas komprenigi sin. Kiam ni forlasis nian domon, la vetero estis malbona, nun ĝi fariĝas pli kaj pli bela, la vento blovas al pobo, ĉio fartas bonege, ĉar mi estas frostema.

Kelkfoje ni agrabligas la vojaĝon, farante krozadon ŝipan, kiel la geemeritoj, ni faras tiel kiam mankas porbiciklaj vojoj.

Post Germanio kaj Svislando, ni transiras la landlimon al Aŭstrio. Ni loĝas en junulargastejo (rezervita kiel la aliaj antaŭe el Francio). Jen PASSAU, oni elparolas « PASAO(N) ». Ni havas sufiĉe da tempo por viziti la katedralon, oni devas vidi ĝin por kredi. Ĉio estas pompa kaj kelkfoje, laŭ mi, malbongustaĵo, tamen belega. Oritaĵoj brilante kiel la unua tago, kaj ĉie okultrompaĵoj.

Nun, jen LINZ. Vespere ni vizitas la urbon ĉiĉeronataj de juna esperantisto, kiun ni rendevuis. Por faciligi la rekonon, ni kunportis nian verdan flagon aĉetitan en Grezijono. La vizitado okazas bone, ni eltrovas lokojn grandiozajn kiuj superelstaras la urbon, tiel oni povas, dank'al nia ĉiĉeronanto, vidi la Danuban gravecon. Mi ĝojas ĉar mia nova amiko komprenas ĉion kion mi diras. La morgaŭan tagon, ni piknikas laŭ la Danubo sur « Esperanto-Platz », kaj ni renkontas du junajn francajn biciklantojn. Poste ni vizitas la abatejon de MELK kiu, sur rokega sprono, superstaras la urbon. La tiea biblioteko entenas multajn librojn (plurajn milojn). Nekredeble !

La tridekan de majo ni atingas VIENO(N) (la nomo originas el Vieno, kiu alfluas la Danubon en tiu loko). Ni vizitas la belegan palacon imperian de Sissi.. Ĝi estas la plej bela palaco en la plej belega urbo, kiun mi vidis el mia vivo. Ni restas du tagojn, kiuj ne sufiĉos. Ni profitas ke, dum dudek kvar horojn, sen interrompo, oni muzikas en ĉiuj kirkoj. La fasadoj estas perfekte prizorgitaj, oni konstatas ĉie rafinitaĵojn en la stratoj. Ni malkovras la domon de Mozart, eble li estas muzikanta « etan noktan muzikon » ?

Jean-Jacques Moreau

Sen aŭ kun ĉapelo ? *

esperanto	français	**esperanto**	français
fugo	fugue (musique)	fuĝo	fuite du fuyard
gago	gag (cinéma)	gaĝo	gage, garantie
gaino	fourreau	ĝaino	jaïn (voir jaïnisme)
gazo	gaze (textile)	ĝazo (=ĵazo)	jazz
gelo	gel (froid)	ĝelo	gelée (gélatine)
gemo	gemme	ĝemo	gémissement
geno	gène (anatomie)	ĝeno	gêne, embarras
generala	du général (militaire)	ĝenerala	général, universel
genro	genre (botanique)	ĝenro	genre (littérature)
germana	allemand	ĝermana	germain (peuple)
gesto	geste	ĝesto	la geste (littérature)
gibo	déplacement de voile	ĝibo	bosse
giri	faire un tour complet	ĝiri	endosser, virer (chèque)
gisi	fondre dans un moule	ĝisi	dire « au revoir... »
glacero	morceau de vître	glaĉero	glacier (géologie)
gojo	goï (non juif)	ĝojo	joie
groso	groseille à maquereau	groŝo	groschen (monaie allem.)
gusta	qui a du goût	ĝusta	juste
Hano	Han (90% des chinois)	ĥano	Khan (titre turc)
hedero	lierre (botanique)	ĥedero	école primaire juive
horo	heure	ĥoro	chœur (musique)
hordo	horde	ĥordo	chorde ou corde (biologie)
hoto !	hue !	ĥoto	jota (danse espagnole)
Hus	Jan Huss, réformateur tchèque	huŝ	oust ! (ou ouste)
igi	(suffixe) rendre	iĝi	(suffixe) devenir
jako	veste	ĵako	jack (électricité)
jaketo	petite veste	ĵaketo	jaquette, redingote
jam	déjà	ĵam’	(radical) brouiller (radio)
jaro	année	ĵaro	jarre
jeto	avion à réaction	ĵeto	jet

*Eltiraĵo de la libreto de Jacques Gaumé "Sen aŭ kun ĉapelo", franca traduko de la libreto de Josef Murĵan "Por kio ĉapelo ?"

En Provenco



De preskaŭ kvin monatoj mi loĝas en Provenco, kie mia familio vivas. Mi venas en tiun regionon por la olivkolektado.

La kolektado komenciĝas meze de novembro kaj povas daŭri ĝis la fino de januaro, laŭ la olivvarietatoj kaj laŭ la vetero.

Oni ne povas kolekti kiam pluvas ĉar oni glitas sur la ŝtupetaroj, sur arbobranĉoj kaj sur la herbo ĉar la regiono estas malebena.

Por eviti la deklivon, la vilaĝanoj konstruis talusojn retenitajn per ŝtonmuroj, nomitaj « restanques » [restank]. Oni ne povas kolekti kiam la mistralo blovas ĉar ĝi estas tre forta vento.

La kolektado similas gimnastikan kunvenon : elstreĉado por kolekti, grimpado kaj ekvilibrado sur la arbo-branĉoj, kurbado por preni olivojn falitajn sur tukoj kaj fine portado de kestoj, kiuj pezas 20 kg.

Oni uzas rastileton por kombi branĉojn kaj faligi olivojn. Nun la tukoj estas ofte anstataŭigitaj per retoj, kiuj estas pli malpezaj.

De antaŭ nelonge oni uzas maŝinojn por skui arbojn kaj faligi olivojn. La kolektado estas tre rapida, sed tiuj maŝinoj estas pezaj, ili faras multe da bruo kaj malodoras pro la benzino.

Necesas ĉirkaŭ 6 kg da olivoj por fari unu litron da oleo. Pluraj olivmuelejoj troviĝas en la regiono, je distanco de 10 km. La malnovaj muelejoj, kiuj elpremis olivojn inter 2 dikaj ŝtonradoj, estas iom post iom anstataŭigitaj per uzinoj, kie oni ne vidas unu oleoguton, kaj kiuj ne odoras oleon, ili estas modernaj iloj !

Kiam okazos la junia pikniko de nia grupo, se mi ne estas konsuminta la tuton de mia olea rikolto dum vintro, mi intencas kunporti botelon el ĝi por ke la partoprenantoj gustumu ĝin.

Françoise Fouquet

La Roterdama kongreso

Kiel la bicikloj sur la larĝaj ebenaj rezervitaj padoj, la kongreso glate ruliĝis dum la semajno. Tre malmultaj ŝanĝoj en la horoj kaj lokoj, prelegoj preskaŭ ĉiam akurataj.



La kongresejo estis sufiĉe granda kaj ĉio okazis en ĝi. Estis impona konstruaĵo kun larĝa ŝtuparo, rulŝtuparo por eniri, ne por eliri. Tion mi aliloke konstatis.

La vetero, dum la unuaj tagoj, estis pluvema. Mi skribis multajn poŝtkartojn plendante pri la pluvo, sed kiam la poŝtkartoj foriris, la bela vetero revenis ! Dankon !

Kiel ĉiam, la inaŭguro estis solena, la festparolado de H. Tonkin trafe argumentita, la parado de la naciaj delegitoj longa : 73 nacioj reprezentitaj, en tute 1845 partoprenantoj.

Estas agrable retrovi la amikojn kaj la samajn kongresajn erojn de kongreso al kongreso. La renkonto kun la estraro bone divolviĝis, ankaŭ la renkonto de la komitatanoj. Laŭ mi estas bona signo pri kontentiga funkciado.

Mi sekvis du prelegojn de I. K. U. (Internacia Kongresa Universitato), la plej facilajn ! ankaŭ kelkajn pri la lando, por prepari la kvintagan postkongresan ekskurson al la norda lando.

Unuafoje, mi havis okazon viziti la Centran Oficejon, en bela konstruaĵo, tre taŭge aranĝita sur pluraj niveloj.

La rendevua tabulo korekte funkciis.

Laŭ mi, diverseco iom mankis dum la vesperoj. Multaj muzikaĵoj kaj kantoj de bonega nivelo, sed, ĉefe por la nacia vespero, mi atendis pli. La internacia vespero estis brila, tre agrabla. Alia tre interesa ero de la kongreso estis la prelego pri Van Gogh. Ĝi estis elstara, sekvata en religia silento. Mi sentis miajn amikojn tiel emociitaj kiel mi. Kiel bona estas tiu komunikiĝo !

La postkongresa ekskurso, bone organizita, kulture riĉa plaĉis al mi. Ni plurfoje ŝipis sur kanaloj, sur lagoj, perfekta maniero ĝui la pej-

zaĝojn. La grandega digo (30 km) impresis min. Oni povas kompari tiun ĉefverkon al la tunelo sub la Manika Maro. En la mezo de la digo estas monumento al la konstruistoj. Dum tiuj kvin tagoj, ni vizitis muzeojn, vilaĝojn. La ritmo ne estis tro rapida, ni havis ĉiam sufiĉe da tempo por admiri. Resume mi diras : « Nederlando = kanaloj ; ŝipoj ; boatoj ; ŝafoj ; nigreblankaj bovinoj ; biciklantoj ; ventmuelejoj ; ventmotoroj. »

Bonega kongreso.

Juanita Turbillon

Memoraĵo al viktimoj de malbono

Meditĝardeno estas loko por espero, vero, pardono kaj akordiĝo. Ĝi estas loko por rememoro al ĉiuj viktimoj de malbono, por akiri forton kaj humilecon por ĉiuj tagoj.

La aŭtoro kaj animo de tuta projekto, de ĝardena arkitekturo kaj de la tuta realizo estas Luboš Hruška, iama politika arestito. En kvindekaj jaroj li estis kondamnita al 18 jara arestiĝo. En la plej teruraj tiutempaj arestejoj li travivis preskaŭ 11 jaroj. Jaroj, plenaj de sufero, sed ankaŭ jaroj, kiuj riĉigis lian vivon per interkonatiĝo kun homoj, kiuj en tiuj arestejaj kondiĉoj disdonadis ĉirkaŭ si afablecon, pardonon kaj amon. Inter ili li travivis ankaŭ kredon kaj tie ankaŭ ekestis lia promeso: « Se mi ĝisvivos, trasuferos ĉiujn kruelaĵojn, humiligon, mi ŝanĝos fruktĝardenon de nia familio Hruška, Doudlevce, Pilzeno. Mi tie kreos, fondos *Memoraĵon pri viktimoj de malbono.* »

Post lia reveno el la arestejo li likvidis, faligis ĉiujn fruktarbojn, kreskigis milojn da koniferoj kaj tiel li realigis sian planon; li kreis unikan ĝardenarkitekturon. Kiam li konatiĝis kun akademia eminenta skulptisto Roman Podrázský, ekestis inter ili Granda Amikeco kaj spirita interkompreniĝo. La skulptisto kreis monumenton „Kruc-vojon", konvenan por tiu belega parko. Ĝi konsistas el 12 sablaj kelktunaj skulptaĵoj, kiuj estis veturigitaj el urbo Přibyslav al Pilzeno kaj instalitaj en la Meditĝardeno. Ekestis magia, ĉarma, rara parko, kiun vizitadas miloj da homoj el diversaj landoj. En 1991 estis la Kruc-vojo sanktigita fare de kunarestito de sinjoro Hruška, Abato P. Vítek Tajovský el Klostro Želiv kaj de tiu tempo servas la Ĝardeno por spiritaj renkontiĝoj kaj kristanaj societoj. Sian lokon ĉitie trovis ankaŭ koncertoj, kulturaj programoj, eĉ junaj homoj kun gitaroj tie sidas ĉe tendarfajro.

En 1993 Luboš Hruška fondis "Fondaĵon por la Memoraĵo de viktimoj de malbono". De ĉeĥaj kaj eksterlandaj homoj, societoj, malgrandaj eĉ pligrandaj donacoj kaj monkolektoj gajnis la Fondaĵo, proksimume 6 milionoj da kronoj. Helpe de ĉi tiu monsumo la Meditĝardeno estis kompletigita per "Kapelo de sankta Maximiliano Maria Kolbe". La aŭtoroj de la projekto estas inĝeniero arkitekto Jan Soukup kaj inĝeniero arkitekto Jiří Opl el Pilzeno. Al ĉiuj, kiuj helpis realigi la Memoraĵon: "Dio rekompencu vin". Por ĉi tiu tutviva verko, ricevis L. Hruška aprezon de Konsilantaro de la urbo Pilzeno. En 1992, li ricevis "Historian sigelon de la urbo Pilzeno" pere de primatoro kaj "Ŝtatan honorigon". La 28ª de oktobro 1997, okaze de la 97ª jubileo, ekesto de nia respubliko, donis prezidanto de la respubliko al L. Hruška por liaj eminentaj meritoj pri demokratio kaj homaj rajtoj la Ordenon de T. G. Masaryk.

Vortoj al la fino : "Sinjoro Hruška, vi estas verŝajne feliĉa homo, ĉu ne vere?" Tiel min alparolis unu sinjorino el grupeto, kiun mi gvidis tra la Ĝardeno. "Jes, diris mi. Mi estas feliĉa. Mia vivo estis vere malfacila, ĝi min ne tro dorlotis. Mi vidis ĉirkaŭ mi amasegon da turmentoj, mi travivis kvantegon da doloroj kaj kruelaĵoj, homsubpremadon. Sed en tiuj kruelaj tempoj ankaŭ trabrilis amradioj, espero kaj pardono, interpaciĝo. Tiu terura tempo alportadis krom murdojn, sinmortigadojn ankaŭ lumon, amikecon, ĝi forĝis nin por vivo eĉ morto. Mi ekkonis unuopulojn, kiuj per sia moralsento superis ĉiujn aliajn. Mi sopiris amikiĝi, fratiĝi kun ili – mi konatiĝis kun Kristo, ekkomprenis ankaŭ lian amon kaj veron. Ankaŭ ni, hodiaŭ, estimu sin mem, la homojn ĉirkaŭ ni, spiritajn valorojn, kulturon kaj aĝon. Ni penu esti homoj ĉiam kaj ĉie."

Marie Zíková

Flaŭno kun kukurbetoj

- 600 aŭ 700 gramoj da kukurbetoj
- 1 ½ glaso da sukero
- 1 glaso da lakto
- 75 gramoj da fendita butero
- 1 ½ glaso da faruno
- 3 ovoj
- Vanilo aŭ fruktoj, naturaj aŭ en alkoholo.

Senŝeligu kaj senkernigu la kukurbetojn.
Kuiru en vaporo kaj miksŭ.
Batmiksu la ovojn kun la sukero, ĝis kiam la miksaĵo fariĝas blanka.
Metu la buteron, la farunon, la lakton kaj miksu.
Aldonu poste la parfumon, aŭ la fruktojn.
Kuiru en forno dum 40 minutoj th 7.

Konfitaĵo de kukurbetoj

- 2 kilogramoj da kukurbetoj senŝeligitaj kaj senkernigitaj
- 1supkulero da freŝa zingibro (aŭ pulvorigita)
- 1,4 kilogramoj da sukero

Kuiru.
Miksu meze de la kuirado.
Kontrolu la kuiradon kaj metu en potojn.

M-C Ledoux

♦♦♦♦♦♦♦♦♦♦♦♦♦♦♦

Pri Gresillon kaj s-ino Micard

De la plej frua tempo de la ekzisto de la Esperantista Kulturdomo Gresillon, mi ofte tien iris kaj havis la plezuron konatiĝi kun tre interesaj personoj. Ekzemple kun la unua grupo de britaj esperantistoj mi amikiĝis kun tre valora paro: ges-roj Brownlee, agemaj esperantistoj multege laborantaj por disvastigi Esperanton en la regiono de Hescham, kunlabore kun Marjorie Boulton tiama gimnazia direktorino en tiu urbo. Ankaŭ kun grupo de junaj germanaj gajuloj, kiuj havis kiel signalkrio "ovo, ovo". Mi longe memoros nian viziton de Parizo. Ni ilin dispartigis en du grupojn, mi ne memoras la nomon de la franca esperantisto gvidinta unu grupon, mi gvidis la alian. Ni ne uzis la saman vojon, alvenintaj sub la Eifel-turo ni mire aŭdis de supre "ovo, ovo !" La alia grupo jam troviĝis sur la unua etaĝo, sed ne vidis la triumfarkon.

Tion dirite por sciigi, ke mi vidis multon de la eventoj en Gresillon ekde la komenco. Ofte kun intereso mi legas la raportojn, ĉe la tabulo en la koridoro, laŭdantaj sinjoron Micard. Fakte dank'al lia longa kaj energia baraktado ni ĝuas la ekziston de la Esperantista Kulturdomo Gresillon kaj mi plene konsentas ke oni omaĝu al li, sed, tre ŝokas min ke oni ne skribas « **gesinjoroj Micard** », ĉar sinjorino Micard gigante laboris en tiu loko. Plurajn fojojn mi vidis ŝin kunportanta sur ĉarumo pezan ŝarĝon de tukoj al la banejo kaj lavanta ilin, ankaŭ ŝi laboris en la kuirejo, helpis por servi, purigis la domon, ktp, ktp, ĉiam bonhumora, eĉ kiam al ŝerculoj taŭzetantaj ŝin dum la manĝoj, ne kolere ŝi ĵetis sian faman "futu al mi la pacon !" Neniu sinjorino tiom multe donis de sia persono por la sukceso de la Esperantista Kulturdomo, kaj neniu volus tion fari. Pro tio ŝi ne estu forgesita.

André Aude

De NI al ... JONKVILO

N	I						
O	N	I					
I	N	K	O				
V	I	N	K	O			
I	N	V	O	K	O		
K	O	N	V	O	J	I	
J	O	N	K	V	I	L	O

De VI al ... KOVRILOJ

V	I						
I	V	O					
V	O	L	I				
O	L	I	V	O			
V	I	O	L	O	J		
K	O	V	I	L	O	J	
K	O	V	R	I	L	O	J

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr